

Akademio Internacia de la Sciencoj

Oprof Amri Wandel
Prezidanto



Novjara mesaĝo al AIS-anoj, decembro 2017

Estimataj membroj kaj kunlaborantoj de AIS,

Sojle de 2018 mi ŝatus bondeziri al vi ĉion bonan en la nova jaro, sukceson kaj sanon. Ni resumu la agadon de AIS dum la pasinta jaro, kaj anticipu la planitajn projektojn por la venonta jaro.

La du ĉefaj aranĝoj de AIS dum la pasinta jaro estis multfaceta partopreno en la scienca programo de la 103-a UK en Seulo kaj organizado de la 34-a Sanmarineca Universitata Sesio (SUS) en Varsovio. Pri ambaŭ aperis artikoloj en revuo Esperanto (pri la scienca programo dum la UK en la septembra n-ro kaj pri SUS34 en la novembro). Pri la aktiveco de AIS en la UK (AIS-IKU, Scienca Forumo kaj la AIS-senatkunsido) mi rakontis en la septembra cirkulero, http://www.ais-sanmarino.org/pr/cirkuler/201708postUK-cirk_9.2017k.pdf. Pri la SUS34 vi povas legi en la aldonita artikolo. La inaŭguron de SUS34 partoprenis la rektoro kaj dekano de la Varsovia Altlernejo pri Direktado (WSZ-SW), kaj mi salutis per video-registrita mesaĝo kiu videblas rete (<https://goo.gl/aELD6s>). Estis subskribita kunlabora kontrakto inter AIS kaj la WSZ-SW.

Venontsemajne komenciĝos en Saarbrücken, Germanio, la Novjara Renkontiĝo dum kiu okazos du aranĝoj de AIS: kunveno de AIS-Germanio (2.1.2018) kaj la 11-a sesio de la Internacia Vintra Universitato. Ĝis nun aliĝis ĉ. 200 personoj.

En la somero okazos du gravaj aranĝoj de AIS: la AIS-IKU sesio en Lisbono - vi estas bonvenaj proponi prelegojn (ĝis la 31-a de januaro, bv. sendi resumon kaj biografieton al amri@huji.ac.il) kaj la 35-a SUS dum la Itala Kongreso en San Marino, <http://kongreso.esperanto.it/85/bonvenon.htm>. Jam pluraj AIS-anoj anoncis kursojn dum SUS35. Ankaŭ vi bonvenas proponi kurson aŭ prelegon..

En la pasintjara novjara cirkulero mi rakontis pri surpriza renkontiĝo en scienca konferenco, kun koelgoj el Hispanio kiuj konis Esperanton kaj mian kunaŭtoron de la libro "Kosmo kaj ni", David Galadi. Similaj renkontiĝoj okazis ĉi-jare en du sciencaj konferencoj pri astrobiologio, kiujn mi partoprenis antaŭ 2-3 semajnoj en Ĉilio kaj Nederlando. Ĉi foje mi donacis al la hispanaj kolegoj ĝuste tiun libron, ĉar ĝi estis reeldonita en oktobro okaze de la Kataluna Kongreso, kies ĉeftemo koincidis kun la titolo de la libro: <http://www.esperanto.cat/kongresoj/2017/kosmokajni.php>. La libro estas vendata ĉe UEA kaj FEL, sed kiel membroj vi povas ĝin ricevi ĉe AIS por nur 12 anstataŭ 18 eŭroj.

Fine, ĉar AIS ne plu petas la jarkotizon (0.1 AKU aŭ 6,50 eŭroj), gravas via libervola subteno. Donackvitancojn laŭ la germana impostleĝo eblas peti al trezoristo@ais-sanmarino.org. Eblas pagi per la UEA-konto de AIS (aisc-j), la Paypal-konto de AIS, kreditkartoj aŭ la AIS-hejmpaĝo <http://www.ais-sanmarino.org/>.

Amike, Amri